# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 12 Decembro, 2012

*Kara nia Leganto, farinte komplikan kalkuladon, oni devas konstati, ke, en Marto de 2013 espereble aperos 100-a numero de nia seninterrompa monata eldonaĵo "Saluton!". Okaze de tiu evento la redakcio planas prepari grandan sciencan-literaturan almanakon samtitolan. Kontribuaĵoj estas bonvenaj.*

*Kun granda ĝojo ni informas vin, ke dum lastaj tri monatoj dum niaj tradiciaj kunsidoj aperis tri novaj E-vizaĝoj. Espereble, ili ĉiuj aperos dum la decembraj solenaĵoj.*

*En ĉi numero vi legos gravan informon pri la venonta Zamenhofa festo, ekscios ion pri tertremoj (ne spertos!), pri la E-a lingvo ĉe UN kaj islanda UK. Ek!*

–La Redakcio

## Zamenhofa Festo'2012

Ĉi jara solenaĵoj okaze de Zamenhofa tago okazos en Fisher Building – 84-metra nov-gotika konstruaĵo, lokita je adreso 343 S. Dearborn strato (apud blu-linia stacio "Jackson"). Ni festos dimanĉe, la 16an de Decembro, inter tagmezo kaj 4 ptm en klubejo sur la 19a etaĝo. La partoprenkotizo – ne pli ol $20/persone. Partoprenantoj gustumos manĝaĵoj el la ukraina kuirarto (5-6 specoj de la sama "adorata" nomo – varenikoj). Kultura programo, komuna kantado de E-himno kaj de "Besame mucho" (E-tradukon vidu malsupre, parkerigu ĝin), muzikeroj, poem-deklamado.

### *Kisu min! (Besame mucho!)*

**Kisu min, kisu min arde,**
**Ĉar nin unue kaj laste atingis amor'.**
**Sentas mi, sentas, ke ne hazarde**
**Lasos vi min, el la sonĝ' malaperos vi for.**

**Tiu ĉi-nokte nur steloj nin aŭdas,**
**Sonas de l' am' simfoni'.**
**Sonĝo mirakla finiĝas, adiaŭ,**
**Resti sen plor' devas ni.**

**Kisu min laste kaj forte! –**
**Ĉar unusola nur vi estas mia destin'.**
**Ho, mia kor' vin gardos ĝismorte,**
**Ja, mia kara, mi amas, mi amos nur vin!**

**Tiu ĉi-nokte nur steloj nin aŭdas,**
**Sonas de l' am' simfoni'.**
**Sonĝo mirakla finiĝas, adiaŭ,**
**Resti sen plor' devas ni.**

***-Esperantigis Gregory S. Dolgin***

## Tertremoj *de Johano Bradner*

Informon pri tertremoj mi trovis en miaj libroj pri geologio kaj ankaŭ de mia geologia kurso, trapasita en Oakton Community College. Do, la supraĵo de la Tero estas dividita en kelkajn gigantajn platojn, kiuj estas rigidaĵoj miloj da kilometroj larĝaj kaj 60-100 km dikaj, kiuj translokiĝas tre malrapide trans la supraĵo de la terglobo. Ĉar la platoj inkluzivas kontinentojn kaj submarajn fundojn, la tektonika plata koncepto signifas, ke la kontinentoj kaj submaraj fundoj migras tre malrapide kompare kun la homa vivdaŭro kaj homara historio, sed kovras grandajn distancojn dum la pasado de geologia tempo.



la okcidenta marbordo de Norda Ameriko, la Baha Kalifornia duoninsulo kaj la la okcidenta marbordo norde de San Francisko, estas sur la Pacifika tektonika plato, sed plejparto de Meksikio kaj centra kaj orienta Kalifornio estas sur la Nordamerika tektonika plato. Laŭ la limo de okazas serio de subitaj saltoj kun ofteco de 100-300 jaroj, aŭ eĉ pli malofte. San Franciska tertremo de 1906 estas bona ekzemplo de tiu plat-migrado.

Alia speco de tertremoj estas kreataj per subita (mal)altiĝo de oceana fundo. Tiu ĉi tertrema speco povas kaŭzigi cunamoj, kiuj ruinigas marbordoj de Indonezio, Japanio kaj de aliaj landoj.

Tertremoj ofte okazas ĉe la limo de tektonika pato. Kiam platoj migras, iamaniere ĝiaj randoj glitas unu preter la alia, iam – renkonten. En la lasta kazo, kiam strecado estas tiel granda, ke la froto ne plu ebligas glitadon, oni sentas tertremon. La loko, kie platoj renkontas unu la alian, povas esti videbla sur supraĵo de la tero kiel terfendo, ekzemple, la San Andreas Fault in Kalifornio. Je

PS. Interesa fakto, ke post la prelego okazis interŝanĝo de opinioj kaj evidentiĝis, ke kvar anoj de la E-societo siatempe spertis tertremoj: preleganto mem en Portlando (Oregono), Andreo Kolganov – en Taŝkento (Uzbekio, 28an de Aprilo 1966), Gregoro Dolgin kaj V. Pajuk – en Odeso, Ukrainio (4an de Marto, 1977). La epicentro de la lasta fakte estis en apuda Rumanio (vd foton).

# Estu “Lernu” Pli Riĉa!

La nova biblioteko, kiu lanĉiĝos kun la nova Lernu je la komenco de la 2013, estos multe pli riĉa je enhavo ol la nuna biblioteko. La enhavo inkluzivos multegajn verkojn de Esperanto-literaturo, kaj ankaŭ sonojn kaj filmetojn kun akompana teksto. La planata biblioteko estos aparte utila al komencantoj, pro la eblo traduki vortojn per simpla klako, sed ĝia enhavo estos sufiĉe profunda por esti interesa al esperantistoj de ĉiuj niveloj. Parto de la projekto estas transpreni, kun permeso, tekstojn de la literatura arkivo de Don Harlow, grava usona esperantisto kiu mortis antaŭ kelkaj jaroj. La nova biblioteko havebligos lian laboron al nova generacio de esperantistoj, en facile uzebla formo. ESF finance subtenas la kreadon de la nova biblioteko kiel parton de ĝia subteno por la kompleta renovigo de lernu.net. Se vi mem volas kontribui al la projekto, la Lernu-teamo (teamo@lernu.net) serĉas volontulojn por helpi enmeti tekstojn; alta nivelo de Esperanto ne estas necesa. Financaj donacoj por subteni la laboron de ESF ankaŭ estas tre bonvenaj. *–E. S. F.*

# UEA Intervenis en Esperanto ĉe UN en Ĝenevo

La 27-an kaj 28-an de novembro okazis la 5-a Forumo pri Minoritatoj en la Palaco de Nacioj, la Ĝeneva oficejo de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝia temo estis la plenumado de la Deklaracio pri la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Minoritatoj, adoptita de la Ĝenerala Asembleo de UN la 18-an de decembro 1992. Kiel reprezentantoj de UEA, Cesco Reale kaj Stefano Keller alparolis la Forumon ĉe la tagordero pri malfacilaĵoj spertitaj en la praktikado de la rajtoj difinitaj en la Deklaracio. Laŭ la regularo de UN en kunsido eblas paroli, krom en iu el la ses oficialaj lingvoj de UN, ankaŭ en iu alia lingvo, kondiĉe ke tion akompanu interpretado en unu el la oficialaj lingvoj fare de la intervenantoj. La alparolo de UEA en la 5-a Forumo okazis en Esperanto: Stefano Keller legis kaj Cesco Reale interpretis hispanen, alineon post alineo. UEA atentigis pri la daŭra lingva diskriminacio ĉe laborpostenaj ofertoj, kiu hodiaŭ estas ankoraŭ malpli priatentata kaj malaprobata ol alispecaj diskriminacioj menciitaj en la Deklaracio pri la Rajtoj de Minoritatoj. Dum postkunvena interparolado la sendependa fakulo de UN pri minoritatoj, s-ino Rita Izsák, gratulis pro la interveno de UEA kaj pozitive esprimiĝis pri Esperanto. *–U. E. A.*

# UK’2013 en Rejkjaviko




Al UK de Esperanto, kiu okazos sekvantjare en Rejkjaviko (Islando) jam aliĝis 275 personoj el 43 landoj. Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvokomunumoj estos la temo de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko (20-27 julio 2013) laŭ la decido de la Estraro de UEA.

**Feliĉajn Feriojn kaj Sanan 2013!**



## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

16an de Decembro (Dimanĉe)– Zamenhofa Festo en Fiŝista Nesto, 343 S. Dearborn St., (apud blu-linia stacio “Jackson”), 12:00-16:00.

22an de Januaro – Temo estos anoncata

26an de Februaro – Prezidanta horo